

Flandra **ESPERANTISTO**

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Orgaan van de **VLAAMSE ESPERANTISTENBOND**, St. Klaradreef 59, BRUGGE
Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschijnt maandelijks
Drie en twintigste jaarg.
Nummer 12 (266)
DECEMBER 1956

LIDMAATSCHAPSGELDEN:
Leden: 100 F (met inbegrip van het bondsorgaan)
Steunleden: 150 F (idem)
Inwonende leden: 25 F (met inbegrip van „De Esperantist”)
Jongeren (onder de 21 jaar): 50 F

ABONNEMENTEN:
België: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

D-ro L. L. Zamenhof kaj la Religio

(Okaze de Zamenhoftago)

Lia patro estis ateisto. Lia patrino estis kredantino. Ambaŭ morale tre altstaraj. Li devkonscia. Ŝi amople-na. Tre juna, Zamenhof perdis la kredon. Laŭ lia biografo D-ro Edm. Privat, la kontraŭkristana konduto de multaj tiel nomataj Kristanoj donis la fortan puŝon al tio. Al ni tio povas ŝajni malkuraĝa kaj ne sufiĉe motivita. Sed la homo konsistas ne nur el racio kaj menso. Precipe ne la juna Zamenhof, kiu ŝajne estis malfortika kaj sentema knabeto. Ĉiam li pruvis esti sincera kiel ni montrus poste. En tiuj cirkonstancoj ni devas lasi la juĝon al Dio en tiu afero. Ĉi-okaze estis peniga afero por nia heroo. Kelkajn horojn antaŭ la morto intencante detale priskribi siajn pensojn kaj travivadon de la superuniverso, li skribis: „Mi ne plu tute bone scias en kiu jaro mi perdis la religian kredon sed mi ankoraŭ memoras ke plej altan gradon de nekredo mi atingis ĉirkaŭ 15-16a jaro. Estis ankaŭ la plej turmenta epoko en mia vivo. La tuta vivo perdis, laŭ mi, ĉian sencon kaj valoron. Kun malŝatego mi alrigardis min mem kaj la aliajn homojn, en mi mem kaj en la aliaj vidante nur senracian pecon da karno, kiu ekestas -oni ne scias kial kaj por kio- kiu en la eterneco vivas dum malpli ol la plej malgranda sekundo, kiu baldaŭ forputros kaj en ĉiuj la venontaj nombrelaj milionoj kaj milionoj da jaroj neniam plu revenos. Por kio mi vivas? Por kio mi lernas? Por kio mi laboras? Por kio mi amas?...”

Kio venis en li anstataŭ tiu kredo? Kompletata materialisma koncepto pri la vivo kaj la mondo? Ne! Li kredis al iu potenco kiu, super la tero, donas iun direkton al ĝi kaj gvidas ĝin. Li ne kapablis klare difini tiun potencon. Li honorigis ĝin en la tre bela poemo: „Preĝo sub la verda standardo”. La lastaj vortoj de la citita manuskripto estas: „Mi komencis senti ke morti eble ne estas malaperi...; ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo...; ke

io predestinis min al alta celo...”. Plie li skribis ke tiujn pensojn li havis jam tre juna kaj ke ili nur malmulte evoluis. Lia subita morto ĉe la skribotablo malhelpis al li priskribi tiujn ideojn. Tiel ke lia kredo... estas sekreto kiun li kunportis en la tombon.

Zamenhof tre klare distingis religian kredon el morala konduto. Koncerne al tiu lasta, li estis senkondiĉa ano de Kristo. Al kongreso de junaj Kristanoj kiuj portis saluton al li, li direktis tiujn vortojn: „Kio estas pli bela en la mondo ol la kompleta sekvo de la instruo de Jezuo Kristo?” Ni scias ankaŭ el la instruo kaj la vivo de Zamenhof ke li komencis konsideri la diversajn religiojn kiel malsimilajn endoktrinigojn de sama funda vero. De tie venas lia koncepto laŭ kiu la religio estas unu de la du gravaj faktoroj kiuj dividas la homaron: religio kaj lingvo. Li klopodis por unueco inter la homaro por alproksimigi tiun homaron al la eterna paco. Kiel li laboris por universala lingvo, tiel li ankaŭ komencis labori por universala religio. Unua projekto aperis en 1906 en la broŝuro titolita „Homaranismo”. Sen nomo, ĉar li deziris ne kompromiti la Esperanto-movadon. Li ne volis ke liaj strikte propraj opinioj pri religio estu konsiderataj kiel nedisigeblaj ligitaĵoj al la Esperanto-movado. Ĉiam li forte akcentis ke la „Interna Ideo” de Esperanto kaj la „Homaranismo” estas du malsimilaj aferoj. Kaj kiam liaj menso kaj konscienco devigis lin plu kaj publike labori por religio ununura por ĉiuj popoloj, tiam li mem ĉesis esti oficiala persono en la Esperanto-movado. Tio okazis en Aŭgusto 1912 dum la Universala Esperanto-kongreso en Krakovo: „La nuna kongreso estas la lasta en kiu vi vidos min stari antaŭ vi; en la estonto, se mi povos veni, vi ĉiam vidos min inter vi”. Es-

(daŭrigo p. 2)

5-a Beneluksa Esperanto-Kongreso

La L.K.K. konsistas el jenaj personoj:

- s-ro J. Mols, prezidanto
 - s-ro H. J. Blokker, vic-prezidanto (por L.E.E.N.)
 - s-ro Henri Sielens, vic-prezidanto (por R.B.L.E.)
 - s-ino F. J. Bos-de Pagter, sekretariino Fockema Andreastraat 1, Eindhoven
 - s-ro J. F. J. Burghoorn, kasisto Schouwbroekseweg 70, Eindhoven (p.ĉ.k. 65.76.64 nome de „Esperanto Eindhoven”)
 - s-ro J. Bos, komitatano
 - s-ro J. v. d. Weiden, komitatano
 - s-ro A. W. Withoos, Viottastraat 11, Eindhoven, gazetara servo
 - s-ro E. de Wolf, Repr. de L.E.E.N.
- La vic-prezidanto por Fl.L.E. estas ankoraŭ ne nomata.

PROVIZORA PROGRAMO

Sabato la 8-a de junio

- 14.00 *Malfermo de la Kongresejo.*
- 16.00 *Bonvena vorto de la prezidanto de la L.K.K.*
- 17.00 *Akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro.*
- 19.30 *Oficiala malfermo de la kongreso.*
- 20.00 *Interkona vespero kun amuzoj, filmo, k.t.p.*

Dimanĉo la 9-a de junio:

- 8.30 *Diservo por katolikoj.*
- 8.30 *Diservo por protestantoj.*
- 10.00 *Jarkunvenoj de la tri landaj ligoj.*
- 10.00 *Ekskurso nur por la edzinoj kaj fianĉinoj de la delegitoj.*
- 12.30 *Komuna panmanĝo.*
- 14.00 *Jarkunvenoj (daŭrigo).*
Post la fino de la jarkunvenoj: kongresa foto.
- 17.30 *Komuna tagmanĝo.*
- 20.00 *Festvespero kun balo.*

Lundo la 10-a de junio:

- 10.00 *Aŭtobusa ekskurso al belega Oisterwijk; i.a. vizito al miniaturvilaĝo Rommeldam.*
- 16.00 *Komuna panmanĝo.*
- 18.00 *Fermo de la kongreso.*

Esperanto antaŭ la Eŭropa Konsilantaro

La Komitato por Kulturaj kaj Sciencaj Demandoj de la Eŭropa Konsulta Asembleo pritraktis la rekomendproponon pri eksperimenta instruado de Esperanto dum sia kunsido de septembro en Oslo. Kvankam la subtenantoj de nia afero en la Komitato faris multajn klopodojn, la rezulto estis la sama kiel dum la printempa sesio en Strasburgo. La nombro de la voĉoj por kaj kontraŭ estis denove egala. Niaj kontraŭuloj, kiujn laŭ informoj ni devas serĉi inter la delegitoj, kiuj reprezentas la oficialajn anglan kaj francan lingvojn, precipe akcentis, ke post enkonduko de Esperanto oni ne plu lernus aliajn fremdajn lingvojn. Pro dufoja sensukcesa pritraktado oni nun forstrekis la rekomendproponon el la tagordo. Do, la KK okupiĝos pri la afero denove nur post kiam nova rekomendo estos prezentita. Mi esperas ke tio estos baldaŭ, ĉar la kampanjo estos daŭrigata.

(daŭrigo de p. 1)

perantisto meze de la aliaj esperantistoj.

La „Interna Ideo” de Esperanto estas nenio alia ol morala, etika sintenado aŭ kondutregulo. La „Homaranismo” estas aŭ celis esti: religio.

En kio konsistis tiu religio? Ĝi neniam estis tute ellaborata eĉ ne klare difinata. Komence, Zamenhof kredis ke estus eble ke la anoj de „Homaranismo” daŭrigu praktiki propran religion, se ili havis, kaj nur de tempo al tempo kunvenu por praktiki ian religion, kiu, inter aliaj punktoj, havis ankaŭ tiun ĉi punkton en la deklaro: „ne kredo al la absoluta vero de unu el la ekzistantaj religioj”. Tio estis logike kaj psikologie nebla. Ĉiu religio konsideras sin kiel la absolutan veron. Kaj en tiu kondiĉo la ĉefpastroj ne povas permesi ke iliaj ŝafoj kuru al unuigo kiu neas tiun veron.

Cetere ankaŭ la kredantoj ne povas fari tion se ili en plenaj sincereco kaj konvinko praktikas sian religion. Tie ĉi mankis la alie ofte kaj prave laŭdata realismo de Zamenhof. Estis tiu punkto kiu estis plej ŝanĝata en la dua eldono de la broŝuro pri „Homaranismo”. Nur restis: „sincereco, toleremo je la diversaj religioj kaj plenumo de moralo de frateco”. Tio kio igis nian majstron ŝanĝi tiun punkton estis sendube la malpermeso de la diversaj eklezioj al siaj subuloj por partopreni en tiu movado; Sed certe ankaŭ la konvinko de Zamenhof ke estus krimo fortiri iun el lia religio, se tiu religio donas al li la

internan pacon kaj se ĝi sukcesas ke tiu homo faras bonajn agojn, do vivas kiel bona homo. Kaj tio-ĉi atestas pri la realismo de Zamenhof kaj ankaŭ pri lia delikatsento (= takto).

Tiamaniere la „Homaranismo” tamen ne igis nova kredo. Ankoraŭ malpli nova teologio aŭ filozofio. Ĝi restis ekstera kadro. Tamen religio: Ĉar ĝi honoris la Diecon kaj ordonis difinajn ceremoniojn. Oni ja laŭlegu verkojn de la grandaj instruantoj pri vivo kaj morto kaj pri la rilatoj inter „mi” kaj la universo kaj la eterneco. Oni faru filozofiajn-moralajn preparadojn. Oni kantu himnojn. Tion lastan Zamenhof konsideris tre grava. Li ja sciis ke la homo psike estas ligata al la konkreto; ke li devas havi ion palpeblan kaj senteblan. Tre maloftaj esceptoj estas tiuj kiuj kapablas sin nutri nur per abstraktaj teorioj. „Tiu templo devus doni spiritan ripozon al la maljunuloj, konsolon al kiuj suferas, la eblecon liberigi sian konsciencon...”.

Zamenhof volis tion ankaŭ pro la infanoj. Jen kion li skribis pri tio: „La infano de oficiala, deklarita senreligiulo neniam povas havi en la koro tiun varmon, tiun feliĉon kiun al aliaj infanoj donas la preĝejo, la tradiciaj kutimoj, la posedo en la koro de Dio. Kiel kruelege la infano de senreligiulo suferas kiam ĝi vidas alian infanon, eble tre malriĉan, sed kun feliĉa koro eniri la preĝejon, dum ke mem ĝi ne havas nenan gvidoregulon, nenan feston, neniajn ceremoniojn...” Oni emas demandi al si: ĉu tiu granda vero, kiun tiel profunde konsciis Zamenhof, ne pli pensigis lin? pri la senco, la signifo de tiu vero. Kiamaniere okazas ke infano havas tiun bezonon se tiu bezono ne rilatas je realeco? ĉu tio ni indikas al ia difinita religio kiu difinite konatiĝas kaj kiu difinite estas servenda? Sed Zamenhof kunportis sian sekreton en la tombon.

Plie estas en la „Homaranismo” multaj kondutreguloj „Konsideru la homaron kiel familion” „Juĝu homon ne laŭ ĝia nacieco sed laŭ ĝiaj faroj” „Patriotismo estu nur servo al regiona komunumo de homfratoj sed neni- am malamo al aliaj” „Via religia kredo ne estu herede difinita, sed sincera” „La veraj ordojn de la religio kuŝas en la koro de ĉiu homo en la formo de la konscienco kaj la ĉefa afero estas la reciprokaj estimo kaj helpemo”.

Kiam ni ĉion-ĉi superrigardas entute, ni staras antaŭ provo de Zamenhof kiu malsukcesis kiel religio. Pro tio tamen ni ne havas malpli da estimo kaj amo por Zamenhof. Li postlasis al ni la „Interna Ideo” de Esperanto, kiun ni ĉiuj devas praktiki, ĉar ĝi estas la morale plej alta kondut-

La Loterio de la Universala Kongreso

Kun la celo kuraĝigi la fruan aliĝadon, la Loka Kongresa Komitato decidis lotumi donacojn inter la unuaj mil kotizintaj kongresanoj.

La donacoj entute estas 36 kun suma valoro de ĉ. 50.000 fr.fr. L.K.K. ofertas la unuajn tri donacojn, kiuj konsistas el stipendioj por restado en Marseille dum la Universala Kongreso: Ili estas personaj, netransdoneblaj kaj pagotaj nur al la gajninto je lia alveno en la kongresurbo dum la kongres-semajno.

La aliajn 33 premiojn (ĉefverkoj de nia literaturo kaj abonoj al la plej gravaj internaciaj gazetoj en Esperanto) afable donacis: Universala Esperanto-Asocio, Heroldo de Esperanto, Universala Ligo, La Nica Literatura Revuo, Norda Prismo, Eldonejo „La Stafeto”, Eldonejo „La Koko”, Eldona Societo Esperanto.

Jen listo de la premioj:

1. kontante 15.000 francaj frankoj
2. kontante 7.000 francaj frankoj
3. kontante 3.000 francaj frankoj
4. „Kon Tiki” de Heyerdahl (trad. Brynildsen)
5. „Normandaj Rakontoj” de Maupassant (trad. Dupuis)
6. „Eseoj I” de G. Waringhien
7. „Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo” de I. Lapenna
8. „La Internacia Lingvo-Faktoj pri Esperanto” de I. Lapenna
9. „La Infana Raso” de W. Auld
10. „Rozoj kaj Urtikoj” de P. Thorsen
11. „Ezopa Saĝo” de K. Kaloksay
- 12, 13, 14, 15, 16 Jarabonoj al „Esperanto”, oficiala revuo de U.E.A.
- 17, 18, 19, 20, 21 Jarabonoj al „Heroldo de Esperanto”
- 22, 23, 24, 25, 26 Jarabonoj al „La Praktiko”
- 27, 28, 29, 30, 31 Jarabonoj al „Norda Prismo”
- 32, 33, 34, 35, 36 Jarabonoj al „La Nica Literatura Revuo.”

La lotumado okazos antaŭ publika notario en Marseille tuj post atingo de la postulita nombro de aliĝoj kaj la rezultoj aperos en la esperantista gazeto.

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

regulo „en kompleta harmonio je la instruo de Jezuo Kristo” (Prof. Dr. Mons. Fr. Erdey).

Drs. Fernand Roose - Brugge

Universala Esperanto-Asocio

Tutmonda Esperantista Junularo Organizo (T.E.J.O.)

INTERNACIAJ SKISEMAJNOJ DE T. E. J. O. 1956—'57.

Ankaŭ ĉi tiun jaron TEJO organizas skirenkontiĝon, kiu okazos de la 26-a de decembro 1956-a ĝis la 6-a de januaro 1957-a en la montara vilaĝeto Dienten ĉe „Hochkönig” en la aŭstra liglando Salzburg.

La prezo por la tuta tempo estas 400.— aŭstr. ŝil.; por ĉiu tago malpli oni pagas 35.— aŭstr. ŝil. malpli. Oni povas antaŭpagi al la ĝirkonto 12—201 ĉe „Salzburger Sparkasse”, Salzburg, Aŭstrio; sed antaŭpago ne estas postulata.

Aliĝojn oni sendu *plejeble baldaŭ* al la gvidanto: s-ano Heinrich REITER, Salzburg, I, 557. Ĉar la limnombro por aliĝoj estas 55, tuja aliĝo estas plej oportuna. Ĉiu aliĝinto ricevas detalan cirkuleron; dezirante ricevi pliajn sciigojn oni nepre aldonu internacian respondkuponon. Por aliĝo sufiĉas simpla poŝtkarto aŭ letero kun: nomo, adreso, aĝo, sekso, metio.

La Generala Sekretario

NICOLA MINNAJA

Viale Giulio Cesare 223 - ROMA

Aspektoj de la Lando de la 42-a U.K.

CAMPANO!

Tute proksime al Parizo kuŝas provinco, naskejo de nia civilizacio, al kies montetoj deklivaj kroĉiĝas la vinberbrancoj, obstine vivivolaj. Tiu provinco estas „Champagne”, kie dum miljaro kaj duono tre ofte decidiĝis la sorto de Francujo.

Campano! Kiom da amataj bildoj tiu nura vorto elvokas! Vinoj de la Reĝkronadoj, de la Suverenoj kaj Ambasadoroj, simbolo de nobeleco, alta rango, eleganteco.

Tiel certaj kaj diversaj estas la kvalitoj kaj virtoj de la ĉampano, ke ĉiuj, kiuj ĝin gustumas, trovas en ĝi kvazaŭ rebrilon de la plej bona en si mem. Jen eble la kialo de tiu tutmonda ŝato bone konata.

La ĉampanvino naskiĝas de eksterordinara harmonio inter la naturaj ecoj de la grundo kaj de la loka klimato. Iom seka estas la unua, la alia foje severa, tamen ilia kuneco ŝajnas esti tre favora al la kulturo de iuj selektitaj virtoj, jam delonge adaptitaj al la cirkonstancoj; de la kalka grundo la vinoj prenas siajn guston kaj personecon; de la virtspecoj ili ricevas siajn delikatecon kaj

aromon; fine ili dankas al la klimato sian ŝaŭmokapablojn.

Al tiu kuniĝo de naturaj faktoroj, probable unika en la mondo, aldoniĝis la homlaboro. Kontraŭ la malamika grundo kaj klimato rigora, la vinberisto senĉese batalis kaj plibonigis siajn kulturmetodojn, hodiaŭ atinginte la detalan zorgemon de ĝardenisto.

La subgrunda kalkeco denove helpis la homverkon. En tiu subgrundo facile trahakebla, oni fosis proksimume 200 kilometrojn da profundaj galeriaj keloj, kies temperaturegalecon nepre bezonas la maturiĝado de la vino. En tiuj subteraj vastegaj tem-

42-a Universala Kongreso de Esperanto

Marseille - 3—10 aŭgusto 1957 - Francujo

Adreso : 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille, Francujo.

Telefonoj : Pr. 55-46 ; Fe. 98-18.

Telegrafo : Esperanto.

Banko : James Rosa, Marseille.

Ĝirkonto : Groupe Esperantiste - Marseille n-ro 156-15.



N-ro 1 OFICIALA KOMUNIKO Oktobro 1956

KOTIZOJ : Gis fino de decembro validas la jenaj kotizoj: kongresano 2.400 fr.fr., edz(in)o de kongresano 1.200 fr.fr., junul(in)o ne pli ol 20 jara kaj studentoj 800 fr.fr.

RABATOJ : Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas Individuaj Membroj de UEA (t.e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 400 fr.fr. Edzino de Individua Membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo, sed ne la aliaj familianoj.

UNUA BULTENO : La okpaĝa Unua Oficiala Bulteno, kun listo de Perantoj, provizora programo kaj aliĝilo estas senpage ricevebla ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe la adreso de la Universala Kongreso.

ARTIKOLO : Lokaj esperantistaj societoj, aliĝintaj al Landa Asocio povas senpage mendi artikolon ĉe la Universala Kongreso pri Marseille por klubaj kunvenoj.

NOVA PERANTO : Bonvolu aldoni al la Oficiala Listo: S-ro R. Gonin, 7 Rue des Platanes, Lyon III, Francujo (nur por blinduloj).

POSTKARTOJ : Mendu la kolorajn poŝtkartojn pri la Universala Kongreso: prezo 100 fr.fr. (aŭ kvar respondkuponoj) por 10 ekzempleroj. Haveblaj ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe la Kongreso.

GLUMARKOJ : La plurkoloraj kongresaj glumarkoj estas mendeblaj je la prezo de 100 fr. fr. (aŭ kvar respondkuponoj) por 2 folioj de po 25 markoj. Vin turnu al la Landaj Asocioj aŭ al la Kongreso.

LOTERIO : La Loka Kongresa Komitato decidis disdoni lotumitajn premiojn inter la unuaj mil pagitaj kotizoj. La unuaj tri donacoj konsistas el subvencioj por pasigi la kongresan semajnon en Marseille: respektive 15.000, 7.000 kaj 3.000 fr.fr. Aliajn 33 premiojn reprezentas verkoj de Auld, Kaloksay, Lapenna, Thorsen, Waringhien kaj abonoj al „Esperanto”, „Heroldo de Esperanto”, „La Praktiko”, „La Nica Literatura Revuo”, „Norda Prismo”.

STATISTIKO : (ĝis fino de septembro) : Aŭstrujo 2, Belgujo 4, Brazilo 3, Britujo 12, Bulgarujo 1, Danlando 7, Finnlando 5, Francujo 39, Germanujo 13, Hispanujo 3, Italujo 16, Jugoslavio 8, Maroko 1, Nederlando 7, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 2, Svedujo 13, Svisujo 5, Usono 1. Entute: 146 el 20 landoj.

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

plaj ellaboriĝas malrapide la ĉampano, dum sinsekvo da procedoj zorgemaj kaj majstraj, garantiantaj la perfektecon de la atingota rezultato.

Do, kiam en Marseille vi tenos al viaj lipoj kristalglason diafanan, en kiu ludetas la veziketoj brilaj de la ŝaŭma ĉampano, vi nepre rememoru la animon de tiu altranga vino de Francujo. Ĝi estas ankaŭ la animo de antikva provinco peze riĉa je historio kaj tradicioj.

Kaj kiam vespere, post la kongresaj laboroj, vi sopiros al kor-al-kora intimeo, tiu delikata trinkaĵo alportos al vi la animĝojon de la plej belaj minutoj.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schriftelijke cursussen en uitleendienst:
 Mej. A. C. H. van der Beek, P. C. Hoofst. 90, Amsterdam-Z.
 Penningm.: B. J. J. Albers, Olympiaweg 69III, Amsterdam-Z. Postrek. 34563.
 Adm. Ned. Esp.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O.
 Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915.
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 795320.
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewegstr. 29 Badhoevedorp
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
 Vic-čefd. F. Weeke, IJsseldijk 20, Diepenveen. Postrek. 822075.

Komunikoj de la Ĉefestraro

Aldono al la protokolo pri la L.E. E.N. jarkunveno 1956 en Gent.

Nia Roterdama sekcio „Katolika Esperanto Rondo” atentigas ke sub punkto 27 — vidu la septembran numeron ĉi jaran de N.E., — ne estas menciita ke la delegito de „K.E.R.”, s-ro Em. Goyvaerts dum la jarkunveno donacis al la Fondajo Mabesoone la kompenson de la elspezoj de li faritaj por ĉeesti la jarkunvenon. Per tiu malavara gesto li esperis instigi al pliaj donacoj por la sama celo.

Noto: Espereble la legantoj de N.E. komprenos ke tiu instigo ne celis nur la delegitojn al la ĝenerala kunveno. Donacoj por la Fondajo Mabesoone estas ĉiam bonvenaj.

Sekciaj sekretarioj, atentu:

Art. 15 de la regularo enhavas la kondiĉon ke antaŭ la 10a de januaro 1957 la sekciaj sekretarioj devas sendi al la ĝenerala sekretariino raporton pri la stato de la sekcio. Samtempe oni devas sendi membroliston (tri ekz.) Rilate la lastan ni petas vin la jenon:

- 1e: Kunmetu la listojn alfabete.
- 2e: Indiku la aĝon de la membroj.
- 3e: Skribu klare (prefere skribmaŝine).

Pri 2e. Eble vi miras ke ni petas la aĝon de la membroj. Ne estas malmodesta scivolemo! Ni bezonas tiujn ĉi sciigojn por plenumi la deziron de U.E.A. kiu intencas aranĝi specialan fakon: „Junularo”. Detaloj pri la aranĝo vi povas legi en „Esperanto” de nov. 1956, no. 612, pag. 167.

Ni petas vian kunlaboron pro kiu ni dankas vin anticipe.

Nova estraranino

Kiel anstataŭantino de f-ino Laverman, kiu elmigris, estas elektita f-ino P. Oosthoek en Rotterdam.

Peranto U.K. en Marseille

La peranto por la U.K. estas s-ro J. Telling, Schietbaanlaan 106a, Rotterdam. (Ĉefdelegito).

Partoprenontoj sin do direktu al

s-ro Telling. Li ankaŭ organizos karavanon al Marseille.

Oni do ekskluzive interrilatu kun li kaj ne sendu aliĝilojn aŭ monon al la ĉefestraro.

Paroladantoj

Plurfoje ni ricevis de la sekcioj la demandon: ĉu vi scias la nomon de persono kiu volas fari paroladon en nia klubkunveno?

Jam diversfoje ni petis en nia organo sciigi al ni, kiu volas fari prelegon pri iu ajn temo en sekcio proksima.

La nombro da anoncantoj ne kontentigas nin. Tial ni ripetas nian peton: kiu volas fari paroladon en alia sekcio?

Helpu nin kompletigi la liston de paroladantoj. Bonvolu aldoni kondiĉojn.

Zamenhofkunveno en la Zaanregiono

Sabatvesperon la 15an de decembro 1956a okazos la tradicia Zamenhofa kunveno en la bela konstruaĵo „Ons Eigen Gebouw”, Boschjesstraat en Koog aan de Zaan. Ĉar la kunveno ĉijara havas apartan signifon oni ĝojas ke la rememoraroladon faros s-ano H. A. de Hoog el Amsterdam.

Artistike kunlaboros la konata kantoro „Musica” el Zaandam.

Malfermo de la salono je la 7,30a horo. Komenco je la 8a kaj fino proksimume je la 10a horo.

Esperantistoj el la tuta Zaanregiono kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas kore invitataj. Gevizitontoj kiuj venos per vagonaro forlasu la vagonaron en la stacidomo Koog-Zaandijk.

La LEEN sekcioj Krommenie kaj Zaandam.

La Hungaroj kaj Ni

Estas korvarmige kiel de ĉiuj flankoj alfluas la rimedoj por helpi la hungarajn rifuĝintojn kiuj venis en nian landon. Ni estas certaj, ke la nederlandaj esperantistoj faris sian devon por kiel eble plej bone helpi iamaniere la komitatojn, kiuj prizorgas la bonfarton de la rifuĝintoj. Sed ni esperantistoj, scias, ke en Hungarujo troviĝis multaj esperantistoj kaj kiu ne tuj pensis pri la sorto de nia amiko Julio Baghy? Tial ni opinias, ke la esperantistoj, kiuj havas la eblecon por tio, devas serĉi kontakton kun la samideanoj inter la rifuĝintoj, por ĉiamaniere helpi ilin senti sin hejme en nia lando. Per la radio ni aŭdis, ke la plej granda parto el ili parolas nur hungare kaj tre verŝajne oni ne informiĝis kiuj parolas esperante, tial estas nia tasko esplori tion kaj tial ni volas per ĉi tiu artikolo instigi la samideanojn kiuj havas la eblecon por tio klopodi iamaniere eltrovi la nomojn kaj restadejon de niaj hungaraj samideanoj. Sukcesinte en tio oni povus inviti ilin al niaj klubvesperoj kaj sciigante iliajn nomojn kaj adresojn en nia revuo ili povus korespondi kun aliaj samideanoj kaj tiamaniere eble povus trovi ian laboron.

F. W.

NEKROLOGO

La 11an de oktobro mortis post longa malsaneco s-ro W. Hölzenspies, kuracisto en Baarn. Malgraŭ la distanco kaj doloro li fidele vizitis la klubvesperojn de la Hilversuma sekcio, kaj fervore studis.

Ankoraŭ en 1955a li faris prelegon dum la Roterdama Kultura Semajno.

La 15an de oktobro kvin membroj kondukis lin al lia lasta ripozejo, kie pastoro R. Hensen gvidis la funebbron.

Estimataj samideanoj

„La estraro de sekcio Utrecht invitas la membrojn de najbaraj sekcioj kune festi la naskiĝtagon de Dr. Zamenhof, la 15an de decembro, vespere je la 7.30a en la paŭzejo de la metiolernejo (A.B.S.), enirejo Maliesingel 11b.

Programo: Prelego kun muziko pri japanujo, fare de f-ino Tusveld el Hago kaj aŭdigo per sonrubando de la konata Zamenhof-kantato de Frieso Molenaar.”

La Ora Jubileo de Merkurio



S-ro Driessen gratulas la jubileantan sekcion Merkurio

Sabaton, la 20an de oktobro, la Roter dama Esperanto-Societo „Merkurio” festis sian oran jubileon en la Irene-kaj Beatrix-salonoj en Groothandelsgebouw. Je la 15.30h la estraranoj de la jubileanta „Merkurio” nome: la Sinjoroj J. D. Brakel (Prez.) J. Calado (Vic-prez.) J. Th. de Goeij (Kasisto), la Fraŭlinoj J. M. van den Hengel (Sekretariino, E. M. Maasbommel (komisariino) staris pretaj en la

Irene-salono por akcepti la multajn vizitantojn, kiuj deziris gratuli la festantan societon. Inter la vizitantoj mi vidis Gesinorojn Isbrucker, S-ron J. Telling, kiu parolis en la nomo de U. E.A., S-ron Albers, en la nomo de L.E. E.N. S-ron Driessen, en la nomo de la Espero kaj multajn aliajn. Estis ĝojiga fakto, ke ĉeestis reprezentantoj el Hago, Haarlemo, Amsterdamo kaj Zeist.

Post la akcepto oni ĉetabliĝis por kune ĝui bonan festmanĝon. La prezidanto, S-ro Brakel, tuj sciis krei agrablan kaj festan sferon tiel ke oni sentis sin en familia rondo. Dum la manĝado kelkaj petis la parolon, inter aliaj Fraŭlino M. Vermaas kaj S-ro Fagel el Haarlemo, kiu dum multaj jaroj estis ano de Merkurio.

La festvespero, kiu okazis en la Beatrix-salono, estis grandioza. Ĉiu programero estis anoncata de Fraŭlino Maasbommel. Ĉar multaj familianoj, geparencoj kaj geamikoj neesperantistaj de la Merkurianoj ĉeestis, la programo estis nederlandlingva. Antaŭ la paŭzo deklamis S-ino Aline Markus. Estis ĝuo aŭdi ŝian deklamadon. Post la paŭzo kantis, dancis kaj ludis la rusa-ukraina kantĥoro Wesjolie Rebjata, kiu prezentis folkloran programon. Mi ege bedaŭris,



La estraro de Merkurio atendanta la gastojn

ke mi antaŭ la fino devis forlasi la salonon por kapti la trajnon. Vere la ora Merkurio havis oran feston.

Roter dama Esperanto-Komitato

(Kunlaborkomitato de ĉiuj Roter damaj Esperanto-organizaĵoj)

GRANDA KULTURA VESPERO okazos je sabato la 15-a de decembro 1956, kaŭze de

LA NASKIGTAGO DE D-ro ZAMENHOF,
LA TAGO DE LA HOMAJ RAJTOJ,
LA 5-JARA EKZISTADO DE R.E.K.

La festo okazos en la teatra salono „DE LANTAREN”, Gouvernestr. 133.

La programo enhavos i.a. prezentadojn de konataj Roter damaj artistoj profesiaj, kiel la karakteriza dancistino

BEP TER BRAAK

la multflanka kabaredistino

NELLY ROETERS

kaj aliaj. La muzikon prizorgos altkvalita duo je PIANO-KLARINETO.

La programo estos tre alloga ankaŭ por neesperantistoj. Ĝi enhavos kelkajn ankoraŭ sekretajn tre surprizajn detalojn. Nepre ne maltrafu tiun belan aranĝon! Instigu ĉiujn viajn neesperantistajn parencojn kaj gekonatojn akompani vin! Ili ne bedaŭros.

Enirprezo : 0,75 gld.

Rezervu tiun daton por R.E.K. !

Biletoj jam nun mendeblaj ĉe :

F-ino A. C. Obbes, sekr.,
Boezemlaan 24b, Rotterdam-N.
Tel.: 21068

F-ino M. H. Vermaas, prez.
Nwe Binnenweg 70, Rotterdam-C
Tel.: 128313

DECEMBROMONATO-LIBROMONATO

Regalu vin mem aĉetante unu el la plej novaj libroj:

	gld.	fr.
Kontralte (M. Boulton) poemaro	7.20	95.—
La infana Raso (W. Auld) poemo	7.20	95.—
Koko krias jam (F. Szilagyi) novelaro	7.20	95.—
Eseoj (G. Waringhien)	7.20	95.—
Ezopa Saĝo (K. Kalocsay)	5.—	65.—
La malprudenta Scivolulo novelo el „Don Kiĥoto”	2.70	33.—
Ni en Skandinavio (humora priskribo)	1.25	20.—
Kandid-Zadig-Senartifikulo tri verkoj de Voltaire en unu volumo	8.80	130.—
Kvina Rapsodio (F. Szilagyi), taŭga legaĵo por daŭrigaj kursoj, stencilita	2.50	44.—
La Internacia Lingvo (I. Lapenna) bind.	5.75	73.—
La Morto de Trajno (F. Crofts) „	5.40	67.—
Kredu min Sinjorino (C. Rosetti) „	5.40	73.—
El la Maniko (R. Rosetti) novelaro	7.20	95.—
Miru, Pensu, Ridu (P. Benneman)	5.40	73.—
La Ringo de la Generalo (S. Lagerlof) bind.	2.20	33.—
Misteroj de l'Vivo (Bögh Högsted)	2.50	37.—
Bagatelaro (J. Rosbach) novelaro	4.—	57.—
Barbro kaj Eriko, letera romaneto	0.60	9.—
Vivo de nia Sinjoro Jesuo (Dickens)	3.60	46.—
Serio de 6 salutkartoj por Kristnasko kaj Novjaro	0.60	9.—

MENDU ĈE:

Libro-Servo L.E.E.N., Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O.

Libro-Servo Belga Ligo, Oostenstraat 26, Antwerpen.

Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse Steenweg 72, Brugge.

El Niaj Sekcioj

ALKMAAR. F.ino G. R. J. Zwarekant, sekretariino de nia sekcio en Alkmaar sciigis al ni, ke en la gazeto „Alkmaars Weekblad” anoncgazeto por Alkmaar kaj ĉirkaŭaĵo kaj kiu estas disdonata de domo al domo aperas Esperanto-kurso. Envenis jam kelkaj leteroj de interesigantoj kaj korektotajn taskojn oni povas ensendi al la sekretariino. Ni gratulas la sekcion pro ĉi tiu aktiveco kaj atingita rezulto.

* *

ARNHEMO. La arnhema sekcio disdonis grandskale tre bonan presitan cirkuleron por propandi novan kurson. Samtempe ĝi okazigis gazetarkonferencon en kiu partoprenis kvin reprezentantoj de diversaj gazetoj, kelkaj estraranoj kaj S.ro Pragano. La gazetoj tre favore raportis pri Esperanto, al kio kontribuis ankaŭ la fakto ke en la okaziginta Lingva Kongreso en Arnhemo, Esperanto havis multan sukceson kaj altiris la atenton de multaj personoj. Rezulto de ĉi tiu agado estis ke nun en kunlaboro kun la populuniversitato komenciĝis kurso kun 17 partoprenantoj sub gvidado de S.ro Pragano. Samtempe okazas en daŭriga elementa lernejo kurso kun 35 gelnantoj.

Sabaton la 15-an de decembro la sekcio festos la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof en Talmahuis, Parkstrato en kunlaboro kun la arnhema kunlaborkomitato.

LEEWARDEN. De la 24/9 ĝis 6/10-56 la sekcio Leeuwarden organizis ekspozicion en la publika legejo, kiu estis vizitata de multaj personoj. En la diversaj gazetoj lokaj aperis tre bonaj artikoloj speciale ankaŭ pri la kursgvidanto S.ro O. Nicolaisen, Norvego, kiu antaŭ kelkaj jaroj estis ĝenerala sekretario de la kongresaj komitatoj de la Universalaj Kongresoj de U.E.A.

La kurso komenciĝis per 23 lernantoj. Ni kore gratulas la sekcion pro ĉi tiu bona rezultato kaj ni tre esperas, ke ĝi havigos al la sekcio multajn novajn membrojn.

* *

Sekcio Zaandam. Sekr. P. L. Takstraat 64.

Ĉar nia konversaciejo ankoraŭ estas okupata, ni prokrastas niajn grupkaj konvercasiajn kunvenojn ĝis en la komenco de la nova jaro. Niaj gesamideanoj K. Buys, D. A. F. van Deijk kaj s-ino Wester kontentige gvidas niajn elementan, por diplomo E kaj por diplomo M kursojn. Donacoj en la for-

mo de esperanto libroj okaze de la estontaj festotagoj ankoraŭ estas ĉiam haveblaj ĉe nia libroservo Wetstraat 1A. Cetere ni atendas multajn gemembrojn en nia komuna Zamenhota kunveno sabaton la dekkvinan de decembro en Koog a/d Zaan.

Esperanto en la Lernejo

La Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado” ankaŭ ĉi tiun jaron enketas pri la Esperanto-instruado al infanoj en la lernejoj en Nederlando. Tial ni sendis demandaron al tiuj adresoj, pri kiuj ni scias aŭ supozas, ke Esperanto estas instruata. Por ke la enketo estu kiel eble plej kompleta ni petas helpon al la legantoj. Se vi scias ke en iu lernejo en via regiono oni instruas Esperanton, ĉu en, ĉu ekster la ordinara instruhoroj, skribu al ni la adreson, por ke ni ankaŭ pri tiu instruado povu akiri la necesajn informojn.

En la nomo de la Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado”, Ceintuurbaan 227, Deventer.

C. B. Zondervan
direktoro

Aligu al la 42-a Universala Kongreso de Esperanto

Marseille-Franco - 3-10 aŭgusto 1957

Interkonsente kun la Ĉefestraro de L.E.E.N. subskribinto akceptos la aliĝojn por la supre nomita Universala Kongreso de Esperanto en la bela franca urbo Marseille.

ALIGKOSTOJ:	ĝis 30-12-56	ĝis 31-3-57	poste
Kongresano (1)	f 27.75	f 30.75	f 34.10
Edzino (2)	f 14.25	f 16.10	f 17.50
Gejunuloj kaj)			
Studentoj)	f 9.00	f 10.25	f 11.50

(1) Individuaj membroj de U.E.A. rajtas rabaton de f 3.75.

(2) Edzino de kongresano kiu estas individua membro de U.E.A. rajtas rabaton de f 1.85.

Gejunuloj kaj studentoj ne havos rabaton.

Necese estas, ke ĉiu aliĝinto plenigu aliĝilon, kiu estu sendata al mi. La monon oni pagu je poŝtĉekkonto 2426.19 je mia nomo. Aliĝilojn mi sendos tuj post peto.

Ĉiu aliĝinto ricevos siatempe detalojn pri aranĝota vojaĝo al Marseille.

Studentoj sendu kun la aliĝilo ateston de la fakultato de la universitato ĉe kiu ili studas.

Pri loĝado kaj ekskursoj dum kaj post la Universala Kongreso vi ricevos poste ĉiujn deziratajn detalojn.

Pagojn por la aliĝo, vojaĝo, hotelĉambroj kaj ekskursoj vi faru nur pere de mia poŝtĉekkonto 2426.19. Mi persone plene respondecas pri la mono.

La eksterordinaraj cirkonstancoj en la mondo nepre ne estu kialoj por vi prokrasti vian aliĝon. Pripensu, ke la L.K.K. regule devos daŭrigi la preparadon de la kongresaj aranĝoj. La L.K.K. kore esperas, ke multaj nederlandaj gesamideanoj partoprenos en la 42-a Universala Kongreso de Esperanto.

Telefono 0 - 1800 - 50871
Poŝtĉekkonto 2426.19
Schietbaanlaan 106-a
ROTTERDAM-C.

Plej sincere via
J. Telling
Ĉefdelegito de U.E.A. en
la Nederlanda Teritorio.

KORAN DANKON!

Revene jam en mia hejmo, post agrabla kaj ege interesa migrado tra la bela Nederlando, ankoraŭ restas freŝe en mia memoro la tuta ĉarmo de tiuj neforgeseblaj tagoj feliĉe pasigitaj meze de fervoraj kaj simpatiaj gesamideanoj, kiuj senescepte en plej diversaj rondoj, okaze de miaj vizitoj por prelegi pri la hispana folkloro, amike min akceptis, atente min aŭskultis kaj malavare niun regalas.

Tial, do, mi volas nun deklari, ke se la materia beleco de la nederlandaj pejzaĝoj logis miajn okulojn kaj liveris inspiron al mia fantazio, la ĝentila gastameco de la nederlandaj esperantistoj lasis tiel profundan impreson en mia koro, ke, daŭre de sia pasia senhalta batado — ĝis la lasta tiktaĵo! — ĝi estos arkivo de mia plej alta estimo por la admirinda popolo de la bela Nederlando.

Valencio 16 oktobro 1956.

LUIS HERNANDEZ

JARKUNVENO

Ni rememorigas al niaj gelegantoj ke la statuta ĝenerala jarkunveno de FL.L.E. okazos en Gent je la 9.12.'56 ek de la 15-a horo en kafejo „Colombophile” F. D. Rooseveltlaan, Gent.

TAGO DE LA HOMAJ RAJTOJ

La 10.12.56 estas la tago de la Homaj Rajtoj. Estus tre utile kunligi tiun daton kun la aranĝoj okaze de la datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, kaj estas necese festi ambaŭ tre digne; oni ne forgesu menci ke, laŭ la artikolo 4 de la UEA-statuto „La respekto de la Homaj Rajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo. Oni utiligu la okazon por enmetigi mallongan informon en la loka gazetaro kaj por sendi al la Unuiĝintaj Nacioj, New York, mallongan leteron kun esprimoj de fido al la principoj de la Universala deklaro pri la Homaj Rajtoj. Se iu grupo faras tion, bonvolu averti la sekretarion.

FAMILIAJ MEMBROJ

Jenaj familiaj membroj ricevis por 1956 la sekvantajn premiojn:

S-ino Vandeveldel, Gent: Tipoj kaj Aspektoj de Brazilio;

S-ino Debrouwere, Kortrijk: Miru Pensu, Ridu;

F-ino Hofkens, Antwerpen: Deveno kaj Vivo de Esperanto.

Ankaŭ por 1957 ni balotos dum la Pentekosta kongreso inter la familiaj membroj, kiuj aliĝis antaŭ la 1.5.57. La estraro fiksos la premiojn dum

Universala Esperanto-Asocio kaj la Junularo

UEA komunikas: „En Kopenhago la Komitato decidis akcepti junulojn ĝis la aĝo de 21 jaroj inkluzive, kiel individuajn membrojn de UEA je la duono de la normalaj kotizoj. La junuloj formos la Junularan Sekcion de UEA laŭ organiza formo nun planata de speciala komitato.”

UEA tamen atentigas pri tio, ke ĝi povos akcepti junulajn kotizojn nur, se la junulo informas pri sia *naskiĝ-jaro*.

La junulaj kotizoj por 1957 estas do, en Nederlando, en Belgujo:

por MJ (membro kun jarlibro):

gld. 2,50 b.fr. 35,—

por MA (membro-abonanto)

gld. 5,— b.fr. 70,—

La kotizoj estas pageblaj:

en Nederlando: al s-ro J. Telling,

Schietbaanlaan 106, Rotterdam-C, pĉk. 2426-19;

en Belgujo: (R.B.L.E.) al s-ro J. Soy-

eur, rue du Chêne 91, Seraing, pĉk. R.B.L.E. 13.37.67; (aŭ FL.L.E.) al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, pĉk. 4161.35.

Flandra Ligo Esperantista.

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenestraat 29, Kortrijk.

Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).

Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.

Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)

U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.

Redakcio F.E.: Drs. Fern. Roose, Ste. Klaradreef 59, Brugge.

Koresponda kurso: H. Pirennelaan 25, Gentbrugge.

la kunsido en decembro.

SENDO DE NACIAJ GAZETOJ AL LIGANOJ

Dum la jaro 1956 la sekretarioj sendis al diversaj ligoj, je ilia peto, la jenajn naciajn Esperanto-gazetojn: The British Esperantist al F-ino Rosa Jurion, Antwerpen.

Dansk Esperantoblat, al S-ro G. Jacobs, Leuven.

Franca Esperantisto, al S-ro R. Iserentant, Brugge.

Germana Esperantisto, al S-ro Vanderzeypen, Londerzeel

Norvega Esperantisto, al S-ro Miny R., Brugge.

Oomoto, al S-ino Meurrens.

Por 1957 ni denove donas al ĉiuj ligoj de 1957 la okazon por ricevi la dum unu jaro aperintajn revuojn, elektotajn el la ĉi-suba listo, kondiĉe ke ili petu tion al la sekretario; ili bonvolu aldoni du aŭ tri titoloj, ĉar povas esti ke iu pli frue jam petis la demanditan gazeton. Ni devas ankaŭ averti la supre menciitajn ligojn, ke ili por 1957 ne plu ricevos la saman gazeton kiel por 1956, ĉar aliaj ĝuu ankaŭ de tiu favoro!

Jen la nova listo por 1957: tuj skribu, ĉar por la sama kotizo vi ricevas du gazetojn! Ĉiu ligo profitu de la okazo. Se hazarde ni ricevas pli da demandoj ol ni disponigas gazetojn, ni sendos dum la jaro aliaj revuoj, laŭ la eblecoj!

Grupa Vivado

„Paco kaj Justeco” Brugge.

Enige programapunten. 8 nov. hersengymnastiek verzorgd door R. Myny. Buitengewoon goed in elkaar gezet. Zeer origineel en spannend tot het laatste. Op 15 nov. spreekt de voorzitter over „UNO en de UNESCO”. Daarna R. Martens over „Picto”. Nieuws uit de laatste Esperanto-tijdschriften krijgen wij van de onder-voorzitter Gr. Maertens. Op 22 nov. geeft dan weer de voorzitter een les over „Neologismo” en komt R. Martens andermaal aan de beurt met het onderwerp „Atlantis”. Op 29 nov. is er dan weer een hersengymnastiek. Tussen die programapunten in zijn er korte oefeningen in spreken, vertalen, spraak-kunst.

(Noot v. d. Redactie: Wanneer krijgen wij iets te horen van de andere groepen?).

Amerika Esperantisto
British Esperantist
Bulteno de Polando
Dansk Esperantoblat
Franca Esperantisto
Germana Esperantisto
Norvega Esperantisto
Oomoto
Svenska Esperantobladet
La progreso

TURISMO

Grava Komunikio

La urbestro de GENT farigis kolor-kaj sonfilmon, 16 mm, kiu estas havebla en Nederlanda kaj Franca lingvoj.

La filmoj estas senpage je la dispono de la kultur-edukaj asocioj kiuj petas ilin je konvena tempo, do sufiĉe antaŭ la uzota dato ĉar la intereso estas granda.

Dum 20 minutoj oni povas admiri la historiajn monumentojn kaj la trezorojn de la muzeoj, la floriĉecon kaj la sportokazintajojn.

Pet-formularoj haveblaj ĉe:
Stedelijke Dienst voor Toerisme,
Burgemeester Braumplein 6.

Tel. 25.36.41.

Ni varme rekomendas ĉar la urbestro ankaŭ kalkulas nin inter la kultur-edukaj asocioj.

Okaze de mendo bonvole menci la Esperantan Gazeton en kiu vi legis la anoncon,..... Dankon! J.T.

Vlaams Esperanto-Instituut

Ter gelegenheid van de Esperanto-boekenmaand en de Kerst- en nieuwjaar periode geeft het V.E.I. de hiernavolgende kortingen bij de aankoop van boeken:

Tot 50 F	5 %
van 51 F tot 150 F	10 %
van 151 F tot 250 F	15 %
van 251 F tot 350 F	20 %
van 351 F tot 450 F	25 %
vanaf 451 F	30 %

Tevens bieden wij U bij een aankoop van minstens 100 F een verrassingsgeschenk aan!

Opgelet: de voormelde voordelen worden slechts gedurende de periode van 15.12.56 tot 15.1.57 toegekend.

Mi parolis kun Sinjoro Bokarev

Antaŭ du jaroj aperis el la densa mallumo, kiu regis dum dudek jaroj en Sovjetio nomo de Esperantisto. Oni jam tute ne sciis, ĉu ekzistas ankoraŭ mondlingvanoj en tiu lando, siatempe tre favora al Esperanto — kaj subite oni legis en iu orienteŭropa Esperantobulteno la nomon kaj adreson de s-ro E. Bokarev. Mi sendis Esperantajojn al li, kiel faris ankaŭ aliaj por rekrei kontakton. En orienteŭropaj satelitaj ŝtatoj, kie oni lukstis por la rekonado de Esperanto, s-ro Bokarev fariĝis kvazaŭ faro kaj fonto de espero, kaj ankaŭ en Sovjetio mem li fariĝis centro por la Esperantistoj, kiuj ankaŭ reaperis unu post la alia.

Neniam mi estus pensinta antaŭ du jaroj, kiam mi presigis mem unuafoje la nomon de s-ro Bokarev en „Svisa Espero”, ke mi post mallonga tempo povos persone paroli kun li. Kaj tamen tio fariĝis realeco. En septembro 1956 mi havis okazon fari profesion vojaĝon en Sovjetio, kaj kompreneble mi kaptis la eblecon por trovi sinjoron Bokarev. Post ioma malfacileco, kaŭzita per tio, ke en Sovjetio telefona indekso estas malforta, mi povis telefoni al la hejmo de s-ro Bokarev kaj kvaronan horon poste li jam serĉis min en mia hotelo kaj ni enprofundiĝis en interesan interparoladon. S-ro Bokarev estas afabla sinjoro de 50 jaroj, laŭprofesie vicedirektoro de la lingvosciencia instituto en Moskvo kie li okupiĝas pri kaŭkasaj lingvoj. En sia instituto, antaŭ la aliaj scienculoj, li faris la 24an de januaro 1956 raporton pri la nuna stato de la internacia helplingvo. Resumo de ĝi ĵus aperis en la revuo „Voprosi Jazikoznaniĵa” (Lingvaj Demandoj) el la plumo de s-ro V. P. Grigoriev. Tiun samideanon mi ekkonis ankaŭ pli poste kaj li ĵus sendis al mi la koncernen numeron de la revuo. Mi parolis kun s-ro Bokarev pri la stato de la esperantistoj en Sovjetio, kiuj nun estas pritraktantaj la eblecon formi nacian organizon kaj eldoni propran organon, pri lia vojaĝo al la kongreso en Kopenhago, kiu nur pro tio malsukcesis, ke li fariĝis malsana, kaj multaj aliaj demandoj pri la movado. S-ro Bokarev promesis al mi inviti min por kunsido de Moskvoj esperantistoj, kaj kiam mi revenis de vojaĝo al la Nigra kaj la Kaspika Maroj, mi povis ĉeesti kunsidon tre altnivelan de Esperantistoj, kiuj kunvenadas en la direkcia ĉambro de ŝtata libro-eldonejo. Ili mem estas precipe literaturamantoj kaj surprizis min per sia bona kono pri la aktuala stato de nia literaturo. De Raymond Schwartz ĝis Marjorie Boulton ni pridiskutis ĝin. Ĉeestis krom Bokarev kaj lia filino Ludmila, ankaŭ profesoro Sewak de

la universitato de Erevan (Armenio), franca studento en la universitato de Moskvo kaj i.a. jenaj sinjoroj: Dalidoviĉ, Danovskij, Rytikov, Sergejev, Grigorjev, Starostin. Ni pasigis tre interesan kaj viglan vesperon kune.

Kiam mi trapasis Leningradon, mi sukcesis ankaŭ renkonti esperantiston, tio estis s-ro S. N. Podkaminer. Li rakontis al mi pri la plej novaj sukcesoj de Esperanto en Leningrad. La Esperantistoj tie disponas pri konstanta ejo en la kulturdomo de kooperativo, kie ili dejasas dufoje en la semajno por helpi al informpetantoj. La grupo nun havas 60 membrojn, kursoj kun ĉ. 100 partoprenantoj estas konstante okazataj. En la ĵurnalo „Smena” aperis artikolo pri esperanto, post kiu anoncis sin tiom da interesuloj, ke la grupo eĉ ne povas organizi sufiĉe da kursoj. S-ro Podkaminer estas instruisto pri civila aviado en altlernejo, li apartenas al la sama generacio kiel s-ro Bokarev. En Leningrad do estas la intereso por Esperanto tre granda; oni eĉ ricevos krediton de la urba konsilantaro por la presigo de la unua postmilita Esperantogramatiko en Sovjetio. S-ro Podkaminer tre optimisme rigardas al la estonteco de Esperanto en Sovjetio.

Post mia vizito kaj la interesaj kontaktoj, kiujn mi ekhavis, okazis la katastrofa interveno de sovjeta armeo kontraŭ la hungara popolo. Mi jam estis en Svislando denove tiam, sed mi havis la senton kvazaŭ mi aŭdus post mia dorso la feran kurtenon denove fali malsupren kun tondra frakaso.

Arthur Baur

La Naturamikoj rekonas Esperanton

La delegitoj de la naturamika-internacio kongresis en Hamburgo de 9 ĝis 12 Aŭgusto 1956. Ili estis afable akceptitaj de la hamburga senato en la belega urbdomo. La altnivela festvespero okazis en la parko de Planten un Bloomen kaj estis vizitata de pli ol 4000 aŭskultantoj.

Ĉi tiu kongreso alportis al la tuta esperantistaro grandajn sukcesojn kaj ĝojon, ĉar oni agnoskis oficiale Esperanton inter tiu mond vasta movado kaj permesas fondi esp. fakgrupojn, kiaj jam ekzistas en Belgujo, Aŭstrujo, Jugoslavujo kaj Svislando. La koncernen rezolucion proponis la landa asocio Belgio-Walonio, en kiu lando ankaŭ sidas la komitato de la naturamikoj esperantistaj. Sed ankaŭ en Svislando estis aktivuloj, kiuj favoris la akcepton de tiu rezolucio. Mi nur volas menci la nomon de Manfred Führer, kiu estas SESano kaj la plej aktiva naturamika-esperantisto en Zürich.

En la kongresa-protokolo estas nun fiksita:

Oni akceptis la rezolucion pri Esperanto de la landa TAN asocio Belgio-Walonio. Oni rekonas la naturamikajn esperantistojn kiel Fakgrupon. Per tio oni kreis novan fakgrupon, kiu posedas la eblecon per siaj mond vastaj ligoj (244 ligoj en la tuta mondo) servi al esperanto kaj disvastigi la naturamikan penson.

Bonvolu, se ŝajnas ankaŭ al vi tiu afero grava, sendi salutleterojn al la centra komitato de turista asocio „La naturamikoj” poŝt-fako 1010 Zürich 1.

Gottfried Keller.

BIBLIOGRAFIO

ROZOJ KAJ URTIKOJ, poemaro tradukita kaj originala en Esperanto, de Poul Thorsen; 118 pĝ. 12,7 x 20,2 cm.; griztole bindita kun ruĝa surpriso E!d.: Komuna konversacia klubo, Kopenhago.

Prezo: f 5,95.

Poul Thorsen ne estas nekonata nomo inter esperantistoj-poeziamantoj. Jam dum pluraj jaroj aperis en diversaj Esperanto-gazetoj poemoj liaj, tradukitaj kaj originalaj. Traleginte kaj ĝuinte tiun ĉi libron, mi plene samopinias kiel William Auld, kiu en sia antaŭparolo diras: „Certe por lia kolektita poemaro la tempo jam estas matura!”

Temoj kaj stiloj estas plej diferencaj en tiu ĉi kolekto. Tio koncernas same la originalojn kiel la tradukojn. Oni ne povas aserti, ke Poul Thorsen sin movis sur unu speciala tereno; el

pluraj fakoj kaj branĉoj de la vivo li ĉerpis siajn temojn, kaj ĉiurilate li montras, ke li plene majstras la poeziarton kaj la lingvon por ĉarme elabori siajn temojn. En tradukado kaj verkado de spritaj poemoj li atingis samajn sukcesojn kiel en pritrakto de temoj melankoliaj. Estas mirige kiel perfekte li sukcesis en tradukoj esprimi la sentojn de la aŭtoro, kvazaŭ li mem travivis la spertojn de la verkinto.

Same majstre, iafoje kvazaŭ jongle, li scias manipuli la lingvajn elementojn por atingi la deziratan efektan. La fakton ke Esperanto estas tiel nomita artefarita lingvo, do ne estas tiom rigore ligita al tradiciaj ebloj kaj malpermesoj, li ofte utiligas por krei en tute natura maniero la bezonatajn formojn. En tio li iafoje

(daŭrigo p. 9)

(daŭrigo de p. 8)

permesas al si la konatan poetan liberon, t.e. uzas formojn, kiujn oni en prozo kondamnas, sed en poezio opinias eĉ rimarkinda eltrovo. Jen ekzemple la neologismoj anstataŭantaj la mal-vortojn: *softa, dura, magra, karta, friga* k.a., kiujn mi en prozo malaprobis, sed pri kiuj mi konfesas, ke en kelkaj poemoj ili pravas sian ekzistorajton.

Agrable trafas la sufiĉe vasta, sed nenie ĝena uzo de verboj derivitaj de adjektivoj aŭ substantivoj. Kiel trafa ja estas la esprimo *mi ja devas hejmi ie*. Unu formon mi nepre malaprobis: *Junitagon venis naŭ la vojo laŭ*. Aŭ ĉu la vortoj *naŭ kaj laŭ* estas erare miksitaj? Nekutimajn, sed trafajn akuzativojn mi trovis en *ĉi tie tretis sian propran ritmon kaj en luno sur la branĉojn gutas oron*.

La tuta aranĝo de la libro estas plaĉa. Ĝia unua parto ampleksas 30 tradukojn, la dua 27 originalojn. Plurpaĝe bontrafe farita linia kliŝo adekvate donas apartan ĉarmon al la poemoj.

En la fino de la libro troviĝas biografietoj pri dek sep poetoj, el kies verkoj Thorsen tradukis. Krome li aldonis indikojn pri komponistoj kaj feliĉe! ... klarigon de vortoj ne troveblaj en „Plena Vortaro”, 2a eldono. Senrezerve rekomendinda libro!

G. J. D.

* * *

NI EN SKANDINAVIO, de Willy Breinholst, tradukis F. Szilágyi kaj Regina Emson, ilustris Léon van Roy; 20 pĝ. 15,7 x 22,8 cm. Eld. Norda Prismo, Stockholm. Prezo ne montrita.

En tiu ĉi libreto, kies originala titolo estas „Scandinavians — that's us!” la aŭtoro, dana ĵurnalisto kaj verkisto rakontas laŭ bonhumora, eĉ sprita maniero pri la tri skandinavaj landoj, sed dediĉas siajn spritajn poemojn precipe al iliaj tri respektivaj popoloj.

La ideo eldoni en Esperanto tian libron, ŝajnas al mi bona, precipe ĉar la skandinavaj popoloj akiris simpatian lokon en la historio de nia movado per sia grandioza maniero de kongresaranĝoj, per multfoja akcepto de eksterlandaj gastoj kaj ankaŭ aliamaniere.

Oni tamen ne supozu, ke la libreto estas amasigo de sinlaŭdoj! Kontraŭe, en spice humora formo la aŭtoro prezentas la multajn mankojn, erarojn kaj malbonajn ecojn de la skandinavianoj. En tiu ĉi sinkritiko la leganto tamen facile rekonas ĝuste la bonajn ecojn de la tri skandinavaj popoloj. Kaj krom tio: li sendube rekonos, kvazaŭ rigardante en speculo, plurajn erarojn de sia propra nacio. Multajn erarojn kaj mankojn la homoj ja havas komunaj!

Interesaj Sciigoj

De la grandformata, riĉe ilustrita revuo „Pollando” aperis numero tute en Esperanto. La eldonejo daŭrigos tion se tiu unua provo havos sukceson. Tial la gesamideanoj estos petataj skribi kaj demandi al S. Rosloniec Asocio de Esperantistoj en Polujo WARSZAWA ul. Kozia 3, Polujo.

El Bulgarujo.

Ŝtata eldonejo, ek de Januaro '57 eldonos monatan gazeton 32 paĝan, riĉe ilustritan, tute en Esperanto. La enhavo: pri Bulgaraj kulturo kaj ekonomio, arto, sporto. Ankaŭ parto pri Esperanto mem. La titolo: „Nuntempa Bulgario”. Formato: 21 x 26 cm. Abonprezo: 4 rubloj; 1 Usona dolaro, 7 Anglaj ŝilingoj; 350 Francj Frankoj.

Mendu kaj sendu monon al Bulgara Esperantista Asocio SOFIA Bulv. Stalilin 40, Bulgarujo.

Ankoraŭ el Bulgarujo.

La junulara sekcio proponas al ĉiuj gesamideanoj en la mondo ke la Eo. grupoj posedu amatoran radiostacion. La junaj Bulgaraj esperantistoj jam agas en tiu direkto kaj volas helpi ĉiujn. Skribu al la komisiito: Stojĉo Dimitrov Stojĉev str. Simeon I Nr. 164 SOFIA 3, Bulgarujo.

Dek ses karikaturoj desegnoj aldonas ankoraŭ pli da spico al la jam spicita enhavo.

Pri bonstila lingvaĵo garantias la nomo de Szilágyi. Foresto de *j* en *virinoj*, kiu estiĝis sendube pro okaza malatento. Mi iom miris pri la uzo de *ujo*, *io* kaj *lando* intermikse por landnomoj. Fine: la vorto *hermelino* estas superflua, ĉar por tiu rabobestejo jam ekzistas nomo en Esperanto: *ermeno*.

Rakomendinda libreto, kiu postlasas al la leginto agrablajn impresojn pri la popoloj en la nordo.

G. J. D.

* * *

D-ro R. L. Soni. EKRIGARDO AL BUDHISMO. (Tradukita el la angla. Eldonis: *Budhana Ligo Esperantista*. Broŝ., 47 p., 12 x 18. Prezo: 9 pencoj, havebla de *f-ino M. E. Bowden*, „Clarrach”, *Abbey Drive, Gronant, Prestatyn, North Wales, Britujo*).

La broŝuro prezentas tre koncizan enkondukon al la budaisma doktrino, proponata al la multokupita leganto, neinformata pri enhavo kaj potencoj de budaismo. Ĝi celas servi la budaisman movadon kaj pli bonan komprenon inter budaistoj kaj la cetera mondo, por ke per la renaskiĝo de budaismo la mondo povu saviĝi.

Estas montrataj kelkaj fundamentaj doktrinoj de budaismo. La mondo estas

malsana pro la suferado kiun kaŭzas la avido, t.e. la egoisma deziro asociiĝi kun ĉio kion ni amas kaj disigi de ĉio kion ni malamas. Tiuj egoismaj deziroj kutime kondukas al seniluziigo, al suferado. Por forigi la suferadon la homo superregu tiujn avidojn sekvante la vojon de mem-venko, vojon kiu kondukas al Nirvano, la stato de perfekta ripozo, foresto de deziro, iluzio kaj malĝojo. Menciinte la plej gravajn kontribuojn kiujn budaismo faris en la pasinteco por la bono de la mondo, la broŝuro proklamas ke la okcidenta civilizacio urĝe bezonas la forton de la racia, sublima religio, konsolo kaj espero de triono de la homaro, por eskapi la terurajn aĵojn de nova mondmilito kaj atingi feliĉon, prosperon kaj pacon.

F. C.

* * *

Gaston Waringhien „ESEJOJ” I Boletro. 236 p. Formato: 16 x 32,5 cm. Kun foto pri la aŭtoro. Eldonis: „Stafeto”; Juan Regulo Prez, La Laguna, Kanariaj Insuloj. Prezo: 1,80 U.S. dolaroj + sendkostoj.

Mi ne komprenas ke tiun sesan eldonon de „Stafeto” iu recenzinto povis nomi luksa eldono. Tia ĝi tute ne estas. Komparu nur ekz. kun la Nord-Eŭropaj Esperantaj eldonaĵoj. Teknike ĝi estas eĉ malbona; ĉar post legado oni certe perdis la kovrilon. Sed jes la eldono plaĉas; bona papero kaj klara litero. La foto pri la verkinto estas de la studio Lorelle el Parizo. Laŭ mi ĝi (mi ne diras li!) estas malbela. Eble pro la fakto ke ĝi estas studo kaj eble volas havi signifon. La tuta supra duono montras la frunton (kun kelkaj haroj!). La aliaj partoj de la kapo sur la malsupra duono. Sed plej gravas la enhavo de la libro. Tiu estas absolute rimarkinda. Waringhien estas certe multflanka talentulo. Do ankaŭ varia enhavo. Ne ke ĉiuj eseoj estas egalvoraj. Tute ne. ekz. inter la eseoj kiuj vekas la ridemon mi ne tiom satis „Unu horo kun la Piratoj” kaj certe ne la „Kontribuo Modesta pri la Sercologo” kiu estas laŭ mi malsukcesinta, kiom la „Demono de la preseraroj” kiu estas vere bonege skribita. En la dua parto la „Esperantistaj Siluetoj” estas kun verve priskribitaj kaj tiuj eseoj estas tre rekreaj. Eĉ kortuŝa estas tiu pri Helmi Dresden. La eseo pri Eŭgeno Lanti montras en kiu grado Esperanto povas plenigi, eĉ posedi la animon de iu homo kaj kiom da ideologia valoro kuŝas en Espero. Tiun ĉiuj Esperantistoj devus legi. Legu kaj debatu dum grupkunvenoj! Same absolute ĉiuj samideanoj devus legi la eseon „Esperanto kaj la kompara Literaturo”. Ĝi pritraktas eldiron de la fama Franca filologo Antoine Meillet rilate la naivecon de esperantistoj kiuj volas traduki elstarajn verkojn de la literaturo. Kiu el ni kapablus bone kaj klare kaj komplete kontraŭargumenti? En tiu eseo li trovas la ĝustan respondon, objektivan, adekvatan.

(daŭrigo p. 10)

(daŭrigo de p. 9)

Mi ne volas preparoli tie-ĉi ĉiujn dudek eseojn. Mi ankaŭ ne volas preparoli la lingvon. Ne mi (kiu?) devas dikti al Waringhien iun lecionon. La libro estas certe ne por komencantoj. Sed jes ĝi estas libro kiu pruvas ke valoras la penon finlerni Esperanton. Tia libro estas unu de la rekompencoj post la penado el la studado pri nia lingvo. Mi fine aldonu ke en estas 12 paĝa glosareto pri teknikaj vortoj, propraj nomoj ktp. kaj ke estas ankoraŭ kelkaj preseraroj krom tiuj de la postĝustiga listo ekz. p. 104 linio 20 kaj p. 108 linio 21.

Kiam en mia kolegia tempo iu profesoro volis kun entuziasmo rekomendi al ni libron, li diris uzante Latinlingvan formulon: tolle et lege. Same mi nun diras al vi, kara legant(in)o: prenu (t.e. aĉetu!) kaj legu!

NYT

*
*
*

Martinus. LA IDEALA NUTRAĴO.
(El la dana tradukis C. Graversen. *Edonis: La Spirit-sciencia Instituto de Martinus, Kopenhago, 1956. Bind., 99 p., 12 x 18,5.*)

Per „sciencaj analizoj” Martinus esploras la demandon pri la ideala nutraĵo de la nuntempa homo. Nur malmultaj el la civilizitaj homoj, li diras, estas absolute sanaj. Tion ili ŝuldas al la ne-taŭgaj ĝuaĵoj (narkotaj kaj ebriigaj substancoj) kaj precipe al la nenaturaj nutraĵoj kiujn ili konsumas.

La instinkto preskaŭ perfekte protektas la bestojn kontraŭ eraro en la nutradmaniero. Sed, kvankam la fizika vivo de homo ŝajne similas al tiu de besto, li jam staras sur multe pli alta evoluŝtupo dank’ al sia daŭre disvolviga intelekto. Dume lia instinkto pli kaj pli kripliĝas kaj ne plu funkcias kiel fidinda gvidilo pri nutrado. En ia estonta reinkarniĝo ĝi eĉ tute malaperos.

La nuna homo malbone sin nutras konsumante viandon, fiŝojn, k.s. Lia organizmo jam bezonas pli delikatajn substancojn por sia konservado, ĉar tiuj menciitaj kadavraĵoj kreas vibradon kiu kontraŭagas la normalan funkciadon de la organismo kiu baldaŭ ruiniĝas kaj mortas. La ideala homa nutraĵo estas la pura karno de maturaj manĝeblaj fruktoj. Sed la organismo de la nuna kulturita homo ankoraŭ ne adaptiĝis al tiu nutromaniero. Pleje taŭgas nuntempe nutraĵo konsistanta parte el fruktokarno, parte el produktoj el la vegetala regno, inter kiuj la nefacile digesteblaj estu kuiritaj.

Kiam la homo estos atinginta la finan stadion de sia plidelikatiĝo, li ĉerpas sian tutan nutraĵon senpere el la aero.

Ankaŭ la altaj moralaj leĝoj, diras Martinus, postulas ke li forlasu la konsumadon de animalaĵoj. La dieca ordono ja tekstas: „Ne mortigu”, kaj ne: „Ne mortigu homojn”. Li ne rajtas, buĉante bestojn, forrabi de ili parton de ilia normala vivtempo. Plie, konsumante

animalaĵojn, la homo akcelas al si tro fruan morton, fariĝas sinmortiganto.

Tiu tendenco al murdado necese retroviĝos en la homa estulo kiam li poste denove enkarniĝos. Nur kiam ĉesos la amasmurdado en lia korpo, nur tiam estiĝos ankaŭ la universala paco ekster li. La granda amleĝo plenumiĝos, kiam la homo sin nutros per pura fruktokarno, kies destino estas esti konsumata de iu organismo.

En tiuj „sciencaj analizoj” Martinus intertekstas personajn konsiderojn pri fiziologio, heredeco, metempsikozo, moralo, vegetarismo, kuirarto, k.t.p., spicas ĉion per teknikaj terminoj, prunteprenas komparojn el la kampo ekz. de la elektro, enkondukas siajn asertojn per abundaj „do” kies interligan forton la ordinara leganto ne sukcesas kapti, fojon post foje resendas al sia ĉefverko „La Libro de Vivo” kiam travigo de liaj premisoj fariĝas tro komplika. Ne mirigis, se la leganto tutsimple rezignus pri kompreno de verketo, kiu tamen impresas kvazaŭ vulgariga pro la senĉesa kaj multvorta ripetado de la pli simplaj nocioj, kaj se li seninteresiĝe lasus al fakuloj la zorgon malimpliki la fadenojn de ĝia rezonado kaj decidi pri la scienceco de la proponitaj teorioj.

Pri la lingvo, kontrolita de la SAT Literatura Komitato, ne estu riproĉo. Ankaŭ la papero, preso, bindo estas bonegaj.

Fr. C.

U.N.E.S.C.O. - Novajoj

HINDUJO PLANAS KULTURAJN OKAZAĴOJN POR „UNESKO-MONATO”.

La Registaro de Hindujo pretigis programon de kulturaj okazaĵoj, inkluzive festivalojn, ekspoziciojn kaj montradon de filmoj, okazontaj dum la „Unesco-Monato” — t.e., la periodo de la Naŭa Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESCO, kiu malfermiĝas en New Delhi la 5-an de novembro.

Dum la monato, serio de operaj kaj dramaj produktaĵoj, koncertoj, baletoj kaj filmmontradoj donos al la Delegitoj larĝan ideon pri la varieco de la hinda kultura vivo. Oni difinis unu vesperon por la prezentado de baleto kaj muziko por infanoj.

Inter la interesaj tradiciaj okazaĵoj estos ekspozicio de la antikva hinda arto desegni portretojn sur akvo, kaj historia spektaklo de vestaĵoj portitaj en diversaj partoj de Hindujo de la 7-a ĝis la 18-a jarcentoj.

FINNLANDO ALIĜAS AL UNESKO

Finnlando aliĝis al la Eduka, Sciencia kaj Kultura Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj. La 11-an de oktobro, la Finna Ambasadoro en Londono subskribis la Konstitucion de Unesko ĉe la Brita Ministrejo por Ek-

„Grajnoj en Vento”

La Tutmondaj Interlernejaj Rondoĵoj, Centro en Bienne — Biel, Svislando, alvokas la tutmondan Esperantistaron por urĝa financa helpo! Por la disvastigado de Esperanto ĉe la infanoj, por la venko de la universala lingvo, por la afero de la Paco sur la Terglobo, ni akceptis grandegan taskon. En la momento, kiam multegaj leteroj alvenas ĉiutage al la Centro (tri rondoĵoj en elementaj lernejoj jam funkcias, du aliaj formiĝas), niaj elspezoj fariĝis ne plu elteneblaj: Ju pli da rondoĵoj, des pli da elspezoj!

Modesta salaĵo de instruisto en popollernejoj ne plu sufiĉas.

Ĉar „Grajnoj en Vento” rariĝis entreprenoj tutmonda, ĝi fariĝis ankaŭ *via*. Same kiel ni, vi ja deziras ĝian sukceson! Tiucele ni ĵus malfermis poŝtĉekkonton:

N-ro IVa 9485

Marcel Erbetta, rue des Pins 66
Biel — Bienne 7

Instruistoj! Ni kovru la tutan Terglobon per rondoĵoj „Grajnoj en Vento”! Sindonaj Esperantistoj kunlaboru al nia gravega entreprenoj, financa helpanto!

La iniciatinto de la rondoĵoj:

Marcel Erbetta
instruisto en popollernejo.

sterlandaj Aferoj en Londono, kaj deponis la akceptilon de sia registaro. Unesko nun havas 77 Membro-ŝtatojn.

1956 KALINGA-PREMIO ALJUGITA AL PROF. GEORGE GAMOW

Profesoro George Gamow, de la Universitato en Colorado, ricevis la Kalinga-Premion en valoro de 1,000 pundoj por sia laboro por popularigi la sciencan.

Unesko proponas ĉiujare tiun premion sur bazo de mondonaco, kiun faris s-ro B. Patnaik, ano de la Leĝa Kunveno de la hinda ŝtato Orissa, kiu fondis la premion, tiel por rekonni kompetentan interpretadon de scienco al la ĝenerala publiko, kiel por plifortigi ligojn inter Hindujo kaj sciencistoj de ĉiuj nacioj. Ĝi portas la nomon de Kalinga, la hinda imperio, kiun konkeris antaŭ pli ol 2,000 jaroj Asoka, tiakoste, ke li ĵuris neniam plu fari militon.

Antaŭaj gajnintoj de la premio estis: Prof. Louis de Broglie, 1952; D-ro Julian Huxley, 1953; Waldemar Kaempffert, 1954; kaj D-ro August Pi Suner, 1955.

*Laŭ Unesco-Features
kaj U.E.A.-Informservo*